el la angla

# KONSIDEROJ PRI GANDHI

*eseo de George ORWELL, verkita en 1949*

Sanktulojn oni devus ĉiam juĝi kulpaj ĝis ili estas pruvitaj senkulpaj, sed la testoj, kiujn oni devas apliki al ili, kompreneble ne samaj estas en ĉiuj kazoj. Rilate al Gandhi, oni inklinas demandi: Unue kiomgrade Gandhi estis influita de vantemo, pro la konscio de si mem kiel humila, nuda maljunulo, sidanta sur preĝmato kaj skuanta imperiojn per pure spirita potenco, kaj due, kiomgrade li kompromisis siajn proprajn principojn enirante la politikon, kiu estas nature nedisigebla de devigo kaj fraŭdo? Por doni definitivan respondon oni devus treege detale studi la agojn kaj verkojn de Gandhi, ĉar lia tuta vivo estis kvazaŭ pilgrimado en kiu ĉiu ago estis signifa. Sed tiu ĉi parta aŭtobiografio, kiu finiĝis en la jaroj 1920aj, estas atesto forte pleda por li, des pli pro tio, ke ĝi ampleksas tion, kion li estus nominta la pekan parton de sia vivo, kaj rememorigas nin, ke ene de la sanktulo, aŭ preskaŭ sanktulo, estis tre sagaca, kapabla homo, kiu, se li tiel estus elektinta, povintus esti brile sukcesa kiel juristo, administranto aŭ eble eĉ aferisto.

Proksimume en la sama tempo kiam ekaperis la aŭtobiografio, mi memoras, ke mi legis la unuajn ĉapitrojn en la malbone presitaj paĝoj de iu hinda ĵurnalo. La ĉapitroj – malkiel je tiu tempo Gandhi – bone impresis min. La aferoj, kiuj elvokas lin – manŝpinita tolo, 'animfortoj' kaj vegetarismo – ne estis allogaj, kaj lia kvazaŭ mezepoka programo tutklare ne taŭgis al neprogresa, troloĝata lando. Ankaŭ estis evidente, ke la britoj ekspluatis lin, aŭ opiniis, ke ili ekspluatas lin. Ĝustadire, kiel naciisto, li estis malamiko, sed, ĉar en ĉiu krizo li penis malhelpi perforton, kiu, laŭ la brita vidpunkto, signifis malhelpi ian ajn efikan agon, oni povus rigardi lin 'nia' viro. Private oni iafoje cinike konfesis tion. La sinteno de la hindaj milionuloj estis simila. Gandhi admonis ilin penti, kaj kompreneble ili preferis lin pli ol la socialistojn kaj komunistojn kiuj, se eble, efektive forprenus ilian monon. Ĉu tiaj kalkuloj finfine fidindas, estas dube; kiel diris Gandhi mem, "trompantoj fine nur trompas sin mem"; sed ĉiuokaze la fakto, ke preskaŭ ĉiam oni milde traktis lin estas parte atribuebla al la sento, ke li estas utila. La britaj konservativuloj nur fariĝis vere koleraj pri li kiam, ekzemple en 1942, li efektive turnis sian neperforton kontraŭ malsama konkeranto.

Sed eĉ tiam mi povis vidi, ke la britaj oficialuloj, kiuj parolis pri li kun miksaĵo de amuziĝo kaj malaprobo, ankaŭ sincere ŝatis kaj admiris lin. Neniu iam sugestis, ke li estas korupta, aŭ iel ajn vulgare ambicia. Ili ne imputis al li kiel motivojn timon aŭ malicon. Kiam oni juĝas homon kiel Gandhi'on, ŝajnas, ke oni instinkte aplikas altajn normojn; sekve, oni malatentis kelkajn liajn virtojn. Ekzemple, eĉ laŭ la aŭtobiografio, estas klare, ke lia natura fizika kuraĝo estis tute elstara: la maniero de lia morto poste ilustris tion, ĉar publika homo, kiu estimas sian propran haŭton, estus pli adekvate gardita. Denove, ŝajnas, ke li tute ne posedis tian monomanian suspektemon, kiu, kiel prave diras EM Forster en *Transpaso al Hindio*, estas la komuna hinda malvirto, kiel hipokriteco estas la brita. Kvankam sendube li estis sufiĉe sagaca por trovi malhonestecon, ŝajnas, ke, laŭeble, li kredis, ke aliuloj bonintence agis kaj havis pli bonan naturon, per kiu oni povus aliri ilin. Kaj kvankam li naskiĝis en malriĉa mezklasa familio, komencis sian vivon iom malavantaĝe, kaj verŝajne havis neimponan fizikan aspekton, li ne estis enviema aŭ sentis sin malsupera. Kiam li unue spertis kolorantaŭjuĝon, plej ekstreme en Sudafriko, tio ŝajne iom mirigis lin. Eĉ kiam li efektive batalis kontraŭ koloro, li ne konsideris homojn el vidpunkto de raso aŭ rango. Reganto de provinco, kotonmilionulo, duonmalsatega dravidia kulio, simpla soldato brita – ĉiuj estas



# Gandhi

egalaj: homoj, kiujn li sammaniere traktis. Estas rimarkeble, ke eĉ en la plej malbonaj cirkonstancoj, ekzemple en Sudafriko, kiam li fariĝis nepopulara kiel ĉampiono de la hinda komunumo, ne mankis al li eŭropaj amikoj.

Felietone verkita en mallongaj partoj, la aŭtobiografio ne estas beletra majstroverko, sed des pli impona pro la banaleco de la plejparto de la materialo. Indas memori, ke komence, Gandhi estis juna hinda studento kun normalaj ambicioj, kaj nur iom post iom adoptis siajn ekstremismajn opiniojn iom post iom, kaj, en iuj okazoj, iom nevolonte… Estas interese, ke iam li portis cilindran ĉapelon, lernis la dancarton, studis la francan kaj la latinan, supreniris Ejfel-turon kaj eĉ provis lerni violonludi – celoj por asimili eŭropan civilizacion kiel eble plej ĝisfunde. Li ne estis unu el tiuj sanktuloj, kiuj montras eksternaturan piecon ekde infanaĝo, nek unu el la alia speco, kiu forlasas la mondon post sensaciaj diboĉoj. Li tute konfesas la misagojn de sia juneco, sed efektive ne estas multo konfesenda. Kiel frontispico de la libro estas foto de la posedaĵo de Gandhi je lia morto. Oni povus aĉeti la tuton kontraŭ proksimume kvin pundoj; kaj liaj pekoj, almenaŭ la karnaj, kunmetitaj same aspektus se amasiĝintaj: kelkaj cigaredoj, kelkaj buŝplenoj da viando, kelkaj moneroj de servistino ŝtelitaj kiel junulo, du vizitoj al bordelo (je ĉiu okazo li foriris sen 'fari ion ajn'), unu preskaŭpeko kun la dommastrino en Plymouth, unu koler-eksplodo: jen la tuta kolekto. Li havis profundan seriozecon preskaŭ de infanaĝo, sinteno pli etika ol religia, sed, ĝis li havis proksimume tridek jarojn, nenian vivocelon. Lia unua eniro en publikajn aferojn estis per vegetarismo. Sub liaj malpli ordinaraj kvalitoj oni sentas, dum la tuta tempo, la solidajn mezklasajn aferistojn, kiuj estis liaj prapatroj. Oni sentas, ke eĉ post kiam li forlasis personan ambicion, li devis esti kapabla vigla advokato kaj tenaca politika organizanto, zorge ŝparema kaj lerta manipulanto de komitatoj, kaj nelacigebla kolektanto de kotizoj. Lia karaktero estis eksterordinara miksaĵo, sed estis en ĝi preskaŭ nenio malbona, kaj mi kredas, ke, eĉ la plej malbonaj malamikoj de Gandhi konsentus, ke li estis interesa kaj nekutima viro, kaj ĉu liaj instruoj povas havi valoron por tiuj, kiuj ne akceptas liajn religiajn kredojn, sur kiuj ili baziĝas, mi neniam tute estis certa.



Lastatempe estis laŭmode paroli pri Gandhi kvazaŭ li estus ne nur simpatia por la Okcidenta movado de maldekstruloj, sed ankaŭ integra parto de ĝi. Ĉefe anarkiistoj kaj pacistoj proprigis lin al si, nur rimarkante, ke li kontraŭis centralizon kaj ŝtatviolenton; sed ili ignoris liajn spiritajn, nemondecajn kaj kontraŭhumanismajn doktrinojn. Mi opinias, ke oni ne povas harmoniigi la instruadon de Gandhi kun la kredo, ke Homo estas la centro de ĉio, kaj, ke nia tasko estas plibonigi vivon en tiu ĉi mondo, la sola vivo, kiun ni havas. La instruado estas komprenebla, nur se Dio ekzistas kaj nur se la mondo de solidaj objektoj estas iluzio, de kiu ni devas eskapi. Valoras konsideri la disciplinojn, kiujn Gandhi devigis al si, kaj kiujn, kvankam li ne insistis ke ĉiuj liaj sekvantoj observu ĉiun detalon, li kredis nemalhaveblaj, se oni volas servi aŭ Dion aŭ la homaron: Unue, nenia viandmanĝado, kaj, se eble, neniu bestdevena manĝaĵo en ia ajn formo (Gandhi mem, pro sia sano, devis kompromisi pri lakto, sed sentis, ke tio estis refalo). Nenia alkoholaĵo aŭ tabako, kaj neniaj spicoj aŭ kondimentoj, eĉ el vegetaĵo, ĉar oni ne manĝas pro la manĝaĵo mem, sed sole por konservi siajn fortojn. Due, se eble, nenia koito kaj, se koito devas okazi, naskigi infanojn estu la sola celo, kaj supozeble nur je longaj interspacoj. Gandhi mem, en la meztridekjaroj, votis pri *bramahcharya*, kiu signifas ne nur kompletan ĉastecon sed eliminadon de seksdeziro. Sed sen speciala dieto kaj ofta fastado ŝajnas esti malfacile atingi tiun ĉi staton. Unu el la danĝeroj de lakto-trinkado estas, ke tio incitemas seksdeziron. Kaj fine, jen la ĉefa punkto, iu, kiu serĉas bonecon, tute ne havu aŭ intimulojn aŭ ekskluzivajn amojn.

Intimaj amikecoj, laŭ Gandhi, estas danĝeraj, ĉar "amikoj reagas unu kontraŭ la alian", kaj, per lojaleco al amiko, povas konduki al malbon-

faro. Nediskuteble vere. Plue, se oni tute deziras ami Dion, aŭ Homaron, oni ne rajtas preferi iun ajn individuon. Denove vere, sed tie ne plu harmoniĝas la humanisma kaj la religia sintenoj. Al ordinarulo, amo signifas nenion, se ne temas pri ami iujn pli ol aliajn. La aŭtobiografio lasas konjekti, ĉu Gandhi kondutis nekonsidereme al siaj edzino kaj infanoj, sed ĉiuokaze ĝi evidentigas, ke trifoje li volonte lasus morti sian edzinon aŭ infanon prefere ol ili manĝus viandaĵon preskribitan de kuracisto. La ŝvebanta morto ne okazis, kaj vere estas, ke Gandhi, kiu, oni supozas, direktis multe da moralpremado kontraŭ la elekton, ĉiam lasis la pacienton elekti la vivon kontraŭ faranta peko: tamen, se nur li decidus, li estus malpermesinta la viandaĵon malgraŭ la riskoj. Laŭ Gandhi, devas ekzisti limoj pri kio ni faros, por resti vivantaj; kokinbuljono estas trans la limo. Tiu ĉi sinteno eble estas nobla, sed, miaopinie, la plimulto da homoj opinius, ke ĝi estas malhumana. La esenco de homeco estas, ke oni ne serĉas perfektecon, ke oni iam volonte pekas pro lojaleco, ke oni ne sekvas asketismon ĝis amikaj rilatoj fariĝos neeblaj, kaj, ke fine oni estas preta venkiĝi kaj esti rompiĝinta per la vivo, kiu estas la neevitebla prezo de abunda amo por aliaj homaj individuoj. Sendube, alkoholon, tabakon, ktp sanktulo devas eviti, sed homoj devas eviti ankaŭ sanktulecon. Estas evidenta repliko, sed oni devus esti prudenta pri tio. En tiu ĉi joga epoko, oni tro facile supozas, ke neligiteco estas ne nur pli bona ol plena akcepto de tera vivo, sed, ke la ordinarulo rifuzas ĝin nur pro la malfacileco: alivorte, la meza homo estas malsukcesinta sanktulo. Tio estas duba. Multaj homoj ne deziras esti sanktuloj, kaj estas probable, ke iuj, kiuj atingas aŭ aspiras sanktecon, neniam multe tentiĝis fariĝi homoj. Se oni povus psikologie funde esplori tion, oni eble trovus, ke la ĉefa motivo por neligiteco estas por eskapi la doloron de la vivo, kaj, super ĉio, de la amo, kiu, ĉu seksa aŭ neseksa, estas taskego. Sed nenecesas argumenti ĉi tie, ĉu aŭ ne la alia mondo aŭ la humanista idealo estas 'pli alta'. Ili estas neakordigeblaj. Oni devas elekti inter Dio kaj Homaro, kaj ĉiuj radikaluloj kaj progresemuloj, de la plej milda liberalulo ĝis la plej ekstrema anarkiisto, efektive elektas Homaron.

Tamen oni povas apartigi la pacismon de Gandhi el lia alia instruado. Ĝia motivo estis religia, sed li ankaŭ pretendis, ke ĝi estas definitiva tekniko, metodo kapabla produkti deziritajn politikajn rezultojn. La sinteno de Gandhi malsimilis al tiu de la plimulto da Okcidentaj pacistoj. *Satyagraha*, unue evoluigita en Sudafriko, estis kvazaŭ neviolenta militado, rimedo por venki la malamikon sen doloro aŭ ambaŭflanka malamo. Ĝi necesigis civilan malobeemon, strikojn, kuŝiĝi antaŭ fervojtrajnoj, toleri sturmojn de la polico sen forkuri kaj sen respondi, kaj tiel plu. Gandhi ne konsentis pri la traduko de *Satyagraha* per 'pasiva rezisto': ŝajnas, ke en Guĝarati, la vorto signifas 'firmeco en la vero'. En siaj fruaj jaroj, Gandhi servis britflanke kiel brankardisto en la Afrikansa Milito, kaj li denove volonte farus tion en la milito de 1914-1918. Eĉ post



kiam li komplete kondamnis perforton, li estis sufiĉe honesta por vidi, ke, dum milito, kutime necesas subteni unu aŭ alian flankon. Dum lia tuta vivo li luktis por nacia sendependeco. Do, li ne opiniis, ne povis opinii, ke oni ne rajtas ŝajnigi, ke en ĉiu milito ambaŭ flankoj estas precize samaj, kaj, ke estas tute egale, kiu venkas. Li ne evitis maloportunajn demandojn kiel faris la plimulto da Okcidentaj pacistoj. Rilate al la lastatempa milito, ĉiu pacisto devis respondi al la demando: "Kion pri la Judoj? Ĉu estas egale al vi ilia ekstermínado? Se ne, kiel vi proponas savi ilin sen milito?" Mi devas diri, ke mi neniam aŭdis de iu ajn Okcidenta pacisto honestan respondon al tiu demando, kvankam mi aŭdis multe da evitadoj. Sed okazis, ke oni ja faris al Gandhi similan demandon en 1938 kaj oni povas trovi lian respondon en *Gandhi kaj Stalin* de Louis Fischer. Laŭ Fischer la vidpunkto de Gandhi estis, ke la germanaj judoj devus kolektive mortigi sin, kio "vekus la mondon kaj la germanan popolon pri la violento de Hitler". Post la milito li pravigis sin: oni mortigis la judojn ĉiuokaze, kaj ili povintus signife morti. Oni ricevas la impreson, ke tiu ĉi sinteno konsternis eĉ Fischer, varman admiranton, sed Gan-

dhi estis nur honesta. Se vi ne volas mortigi, vi devas esti preta ofte por mortoj en iu alia maniero. Kiam en 1942 li instigis neperfortan reziston kontraŭ la japana invado, li estis preta konfesi, ke tiu eble kaŭzus plurajn milionojn da mortoj.

Pro la fakto, ke Gandhi naskiĝis en 1869, eble li tute ne komprenis la naturon de totalismo kaj vidis ĉion laŭ sia propra lukto kontraŭ la brita registaro. La ĉefa punkto pri tio ne estas, ke la britoj indulgeme traktis lin, sed, ke li ĉiam povus kapti la atenton de la publiko. Kiel ni vidis el la supra citaĵo, li volis "veki la mondon", kio eblas nur se la mondo povas aŭdi tion, kion vi faras. Estas malfacile vidi kiel la metodoj de Gandhi povus aplikiĝi en lando, kie kontraŭuloj de la reĝimo malaperas meznokte kaj oni neniam pri ili denove aŭdas. Sen libera gazetaro kaj la rajto publike kunveni, neeblas alvoki publikan opinion, neeblas estigi amasmovadon, eĉ neeblas sciigi vian kontraŭulon pri viaj intencoj. Ĉu estas hodiaŭ iu simila al Gandhi en Rusio? Kaj, se jes, kion li efektivigas? La rusa popolo povus praktiki civilan malobeon nur se la sama ideo samtempe okazus al ĉiuj, kaj eĉ tiam, se juĝi pri la historio de la ukrajna malsatego, estas tute egale. Sed eĉ se neperforta rezisto efektiviĝus kontraŭ la propra registaro, aŭ kontraŭ potenco de okupado: tamen kiel oni tion internacie aplikas? La diversaj kontraŭdiraj asertoj de Gandhi pri la lastatempa milito ŝajnas montri, ke li sentis malfacilaĵon pri ĉi tiu. Koncerne fremdan politikon, pacismo aŭ ĉesas esti pacismo aŭ fariĝas kvietigado. Plue, la supozo, utila al Gandhi en rilatoj kun individuoj, ke ĉiuj homoj estas pli malpli atingeblaj kaj respondos al malavara gesto, ne estas necese vera, ekzemple, kiam oni traktas frenezulojn. Tiam la demando fariĝas: Kiu estas mense sana? Ĉu Hitler estis mense sana? Ĉu ne eblas, ke tuta kulturo estas freneza, laŭ la normoj de alia? Kaj, kiom oni povas taksi la sentojn de tutaj nacioj, ĉu ekzistas ia ajn evidenta rilato inter malavara ago kaj amika respondo? Ĉu dankemo estas faktoro en internacia politiko?

Tiuj ĉi kaj parencaj demandoj bezonas diskuton, urĝe bezonas tion, en la kelkaj jaroj, kiujn ni havas, antaŭ ol iu premos la ŝaltilon kaj la raketoj komencos flugi. Ŝajnas dube, ĉu civilizacio povos toleri alian grandan militon, kaj oni povas almenaŭ konsideri, ke neperforto estas ebla eliro. Oni povas krediti al Gandhi, ke li honeste estus respondinta al la speco de demando, kiun mi supre starigas; verŝajne li ja diskutis tiajn demandojn en siaj nenombreblaj ĵurnalaj artikoloj. Oni sentas, ke estis multo, kion li ne komprenis, sed estis nenio, kion li timis diri aŭ pensi. Mi neniam povis multe ŝati Gandhi'on sed mi ne sentas min certa, ke, kiel politika pensanto, li plejparte eraris; kaj mi ne opinias, ke lia vivo fiaskis. Bizare estas, ke, kiam oni murdis lin, multe da liaj plej varmaj admirantoj ekkriis kun bedaŭro, ke li vivis ĵus sufiĉe longe por vidi sian dumvivan laboron ruinigita, ĉar Hindio enlande militis, kio ĉiam antaŭviditis kiel unu el la rezultoj de la transdono de potenco. Sed Gandhi ne pasigis sian vivon provante glatigi la rivalon inter hinduoj kaj islamanoj. Finfine oni atingis la pacan finon de brita regado, lian ĉefan politikan celon. Kiel kutime, la koncernaj faktoj intertranĉiĝis. Unuflanke, la britoj ja foriris el Hindio sen batalado; okazaĵo, kiun tre malmultaj observantoj estus prognozintaj, ĝis proksimume jaro antaŭ ol ĝi okazis. Aliflanke, Laborista registaro plenumis ĝin, kaj estas certe, ke Konservativa registaro, aparte registaro estrita de Churchill, estus malsame aginta. Sed, se, en Britio, en 1945, fariĝis ĝenerala simpatia opinio pri hinda sendependeco, kiomgrade estis pro la persona influo de Gandhi? Kaj, se Hindio kaj Britio fine adoptos decan kaj amikan interrilaton, kio eble okazos, ĉu tio parte estos pro Gandhi, kiu obstine daŭrigis sian lukton sen malamikeco, kaj do desinfektis la politikan aeron? Ke oni eĉ starigas tiajn demandojn indikas lian staturon. Oni povas senti, kiel mi, kvazaŭan estetikan malŝaton por Gandhi, kaj oni povas malakcepti la pretendojn de aliaj pri lia sankteco (parenteze, li mem neniam pretendis tion). Oni povas ankaŭ rifuzi la idealon de sankteco kaj tiel senti, ke la bazaj celoj de Gandhi estis kontraŭ-humanaj kaj reakciaj; sed, se mi rigardas lin simple kiel politikiston kaj komparas lin kun aliaj ĉefaj politikaj altranguloj de hodiaŭ, kian freŝan odoron li sukcesis postlasi!

*elangligis William SIMCOCK*

*Kara Leganto,*

LG havas stokon de libroj eldonitaj en la jaroj 1900-1950. Se vi serĉas ion specifan, aŭ pioniran libron…, skribu al ni. Aŭ petu nian libroliston de RARAĴOJ. Servoprete via. *Libroservo LG*